# *Pli ol unu miliono da kubanoj ricevis la unuan dozon de kontra?-Kovima vakcina kandidato*



Havano, jun 1 (RHK) La direktoro de epidemiologio de la ministerio pri publika sano, dro. Francisco Durán, deklaris dum gazetara konferenco ke “pli ol unu miliono da kubanoj ricevis almena? unu dozon de la vakcinaj kandidatoj Soberana 02, Soberana Plus kaj Abdala.

Li sciigis ke la kubanoj estas vakcinitaj en sanitaraj intervenoj, klinikaj provoj kaj interven-studoj.

La doktoro klarigis ke la protektaj reguloj da?re estas la plej grava afero, kaj nur tiel oni reale povas bremsi la altan propagadon de la malsano en la insulo.

Li aldonis ke  “ankora? la limigaj reguloj ne ebligis la kontrolon de la pandemio kaj tial tre bezonatas la memrespondeco”.

Li sciigis ke nur ses municipoj de la nacia teritorio posedas malaltan nivelon de propagado, dum en aliaj 55 estas tre alta kaj en 68 estas alta.

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/259222-pli-ol-unu-miliono-da-kubanoj-ricevis-la-unuan-dozon-de-kontrau-kovima-vakcina-kandidato

**Radio Habana Cuba**